**Malaliĝo**

Ĝis la 15a de julio: Plena repago de la aliĝkotizo. Malaliĝo poste: Subtraho de 30 eŭroj. Neanoncita nealveno: Subtraho de 50 eŭroj. Por tendumantoj ni subtrahos 10 eŭrojn ekde la 15a de julio.

Ni vin tre petas informi frue pri eventuala neveno por eviti senutilajn elspezojn.

Transdono al alia persono (skribe!): Neniu subtraho; pagendas laŭ la nova aĝokategorio, sed minimume la sama sumo kiel la unua aliĝinto.

**Kontoj**

N-ro 2596 58-301, EsperantoLand e. V., ĉe "Postbank Hannover" (germana banka kodo 250 100 30; internacia kontonumero IBAN: DE07 2501 0030 0259 6583 01, internacia banka kodo - BIC: PBNK DE FF; uzu sen la spacoj inter la literoj); indiku "SOMERE". Ĝiroj al tiu konto kostas en Eŭropa Unio same kiel enlanda ĝiro.

Krome konto eold-g, EsperantoLand, ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj eold-g, EsperantoLand, ĉe Universala Esperanto-Asocio. Eblas antaŭpagi per sendado de eŭro-monbiletoj aŭ ĉeko (je risko de la sendanto).

Laŭ via deziro ni traktos ĉekon nur kiel garantiaĵon kaj redonos ĝin dum via pago por eviti bankokostojn.

Ĉu vi interesiĝas? Ni kompreneble ĝojos, se ni baldaŭ ricevos vian aliĝon aŭ informon pri via intereso. Plenigu la aliĝilon ĉe

http://www.EsperantoLand.org/somere

aŭ sendu retmesaĝon, leteron aŭ telekopion al

EsperantoLand e. V.
Lu Wunsch-Rolshoven
Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus
10551 Berlin
Germanio

somere2008@esperantoland.org
telefono +49-30-685 58 31 (en Germanio 030-685 58 31)
telekopiilo +49-30-68 05 70 11 (en Germanio 030-68 05 70 11)

Eble vi ne volas tuj aliĝi, sed ŝatus havi aldonajn informojn. Ni volonte sendos ilin al vi.

---

Eble vi ankaŭ interesiĝas pri nia

**7a Novjara Renkontiĝo (NR)**
de la 27a de dec. 2008 ĝis la 3a de jan. 2009
en Frankfurt/Main
http://www.esperantoland.org/nr

# 6a SOMERE
# SOmera MEzeŭropa REnkontiĝo
# en
# Kall-Krekel, Germanio
# (inter Kolonjo kaj Trier)

**1a ĝis 17a de aŭgusto 2008**
**(vendredo ĝis dimanĉo)**



**Venu SOMERumi kun ni!**

Ni pasigos somerajn tagojn, ĝuos la naturon, ludos, babilos, aŭskultos prelegojn kaj ekskursos. Se vi volas sperti internacian Esperanto-etoson, pasigi agrablajn feriojn, praktiki Esperanton aŭ eklerni la lingvon – jen renkontiĝo por vi.

**Por la kreskigo de Esperantujo**
**www.EsperantoLand.org**

**Kiel kutime: Bela ĉirkaŭaĵo**

La domo troviĝas en bela pejzaĝo; ĝi multe plaĉis al ni jam antaŭ kelkaj jaroj, kiam ni unuan fojon tie feriis. La ĝardeno estas relative granda - apud la domo estas razeno kun infanaj ludiloj por ludi kaj ripozi. Ĉirkaŭe etendiĝas kampoj kaj arbaroj. En la ĝardeno troviĝas ankaŭ loko por la jam tradicia tendaro de kelkaj partoprenantoj. En la domo troviĝas kvar diversgrandaj salonoj por prelegoj, kursoj, laborgrupoj, koncertoj ktp.

**Naturo kaj kulturo**

Ni havos lingvokursojn kaj prelegojn, faros promenojn kaj ekskursojn, ni babilos kaj ni ludos ekstere kaj endome. Estos Esperanto-kursoj por komencantoj kaj konversacia rondo. Kelkaj prelegoj kaj aliaj ofertoj de partoprenantoj iom klerigos nin. Ni planas promenojn en la kamparo kaj arbaro, vizitadon de naĝejo kaj ekskursojn al najbaraj urbetoj. Kaj eble vi havas plian ideon kiel pliriĉigi la programon. Tiam bv. kontakti nin

**Internacia partoprenantaro**

Kutime ĉeestas kvardeko da homoj el kvin ĝis dek landoj – la plimulto venas el eksterlando kaj alportas internacian etoson. Multaj partoprenantoj alveturas el la najbaraj Belgio, Nederlando kaj Francio kaj kelkaj el pli foraj landoj kiel Britio, Pollando aŭ Siberio.

**Por unuopuloj, paroj kaj familioj**

La aĝogamo certe estos simile vasta kiel dum la pasintaj jaroj: de infanoj ĝis sepdekkelkjaruloj.

**Lerni Esperanton kaj tuj apliki**

Ni denove ofertos intensan kurson en la unuaj tagoj por ebligi la partoprenon al komencantoj kaj progresantoj. Tiel eblos en unu sama aranĝo rapide eklerni kaj tuj poste praktiki la lingvon en internacia medio.

**Tranoktado en ĉambro aŭ tendo**

Vi povos laŭplaĉe elekti, ĉu loĝi en la domo aŭ en tendo, ruldomo aŭ loĝauto. Kompreneble via familio ankaŭ povos dividiĝi - eble viaj infanoj entuziasmas pri tendo kaj vi malpli ...

La domo havas ĉambrojn por unu ĝis kvar personoj. Duŝoj kaj necesejoj atingeblas ekde la koridoro.

**Memzorgado kaj rabatoj**

Se vi ŝatos, vi povos mem zorgi pri viaj manĝoj - kaj tiel redukti vian kotizon. Krome estas rabatoj por eksterlandanoj kaj programkontribuantoj.

**Tempodaŭro laŭ via elekto**

Estas dusemajna renkontiĝo. Eble vi havos malpli da tempo kaj emo - restu kun ni tiel longe kiel vi deziras.

**Plena kotizo en eŭroj (por 16 tranoktoj; enkrampe la taga kotizo)**

| Aliĝo ĝis | 1a de julio | 28a de julio | poste |
|---|---|---|---|
| ĝis 3 jaroj | 0 | | |
| 4 ĝis 17 | 320 (tage 20) | | |
| 18 ĝis 26 | 480 (tage 30) | 496 (31) | 528 (33) |
| ekde 27 | 560 (tage 35) | 576 (36) | 608 (38) |

(Aĝo je la komenco de la renkontiĝo)

La kotizo inkluzivas por 16 tagoj la manĝojn, la uzadon de lito en dupersona ĉambro kun litotolaĵo kaj la programon, sed ne la ekskursojn.

**Unupersona ĉambro:** aldono de 112 eŭroj (7 eŭroj tage).

**Tri-/kvarpersona ĉambro**, ekde 19 jaroj: redukto de 112 eŭroj (7 eŭroj tage).

**Partopreno en tendo, ruldomo, loĝaŭto kun manĝoj (16 tranoktoj/tage)**

| Aliĝo ĝis | 1a de julio | 28a de julio | poste |
|---|---|---|---|
| ĝis 3 jaroj | 0 | | |
| 4 ĝis 17 | 224 (tage 14) | | |
| 18 ĝis 26 | 336 (tage 21) | 352 (22) | 384 (24) |
| ekde 27 | 384 (tage 24) | 400 (25) | 432 (27) |

**Partopreno en tendo, ruldomo, loĝaŭto (memzorgantoj; 16 tranoktoj/tage)**

| Aliĝo ĝis | 1a de julio | 28a de julio | poste |
|---|---|---|---|
| ĝis 3 jaroj | 0 | | |
| 4 ĝis 17 | 64 (tage 4) | | |
| ekde 18 | 112 (tage 7) | 128 (8) | 144 (9) |

La kotizo por memzorgantoj inkluzivas la programon, la lokon por meti la tendon (aŭ ruldomon/loĝaŭton) kaj la uzadon de salonoj, duŝoj ktp.

**Rabato por eksterlande loĝantoj (plenkreskuloj)**

32 eŭroj por 16 tranoktoj (2 eŭroj por ĉiu tranokto).

**Partatempa partopreno:** La kotizo por partatempuloj inkluzivas la vespermanĝon de la alventago kaj la matenmanĝon de la lasta tago.

**Antaŭpago:** Por ĉiu persono 50 eŭroj (kun lito/manĝoj); 20 eŭroj por tendumantoj kaj uzantoj de ruldomo aŭ loĝaŭto sen manĝoj.

**Aliĝdato:** Ni kalkulos laŭ la alvendato de la aliĝo papera aŭ retpoŝta, se la aliĝanto ĝis la limdato forsendas la antaŭpagon. La aliĝo validas nur post alveno de la antaŭpago kaj post nia konfirmo.

**Aliĝilo por la 6a SOMERE**

2008-08-01 ĝis 2008-08-17 en Kall-Krekel, Germanio

O Mi/ni aliĝas kiel plenpaganto(j).

O Mi/ni aliĝas kiel tendumanto(j) kun manĝoj.

O Mi/ni aliĝas kiel tendumanto(j) sen manĝoj.

Partopreno: 2008-08-01 ĝis 2008-08-17/aliaj datoj:

| Persona nomo, familia nomo | viro/ino | naskiĝdato |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

Adreso, lando:

Telefono: _________________ Telekopiilo: ______________

Retpoŝta adreso (tre legeble!): _________________________

Kiom da personoj manĝos vegetare__/ne gravas__/ nevegetare__?

O Mi/ni loĝos en dulita ĉambro.

O Mi ŝatus loĝi en unupersona ĉambro.

O Mi ŝatus loĝi en tri-/kvarlita ĉambro.

Via ebla kontribuo al la programo (eble notu dorsflanke):

Rimarkoj:

Mi/ni venos per O trajno O aŭto O aviadilo.

O Vi rajtas mencii mian nomon sur la SOMERE-retpaĝoj.

Mi antaŭpagos 50 eŭrojn por ĉiu aliĝinto.

Dato Subskribo

(sendu al: EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 10551 Berlin, Telekopiilo +49-30-68 05 70 11)

**Aliĝilo por la 6a SOMERE**

2008-08-01 ĝis 2008-08-17 en Kall-Krekel, Germanio

O Mi/ni aliĝas kiel plenpaganto(j).

O Mi/ni aliĝas kiel tendumanto(j) kun manĝoj.

O Mi/ni aliĝas kiel tendumanto(j) sen manĝoj.

Partopreno: 2008-08-01 ĝis 2008-08-17/aliaj datoj:

| Persona nomo, familia nomo | viro/ino | naskiĝdato |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

Adreso, lando:

Telefono: _________________ Telekopiilo: ______________

Retpoŝta adreso (tre legeble!): _________________________

Kiom da personoj manĝos vegetare__/ne gravas__/ nevegetare__?

O Mi/ni loĝos en dulita ĉambro.

O Mi ŝatus loĝi en unupersona ĉambro.

O Mi ŝatus loĝi en tri-/kvarlita ĉambro.

Via ebla kontribuo al la programo (eble notu dorsflanke):

Rimarkoj:

Mi/ni venos per O trajno O aŭto O aviadilo.

O Vi rajtas mencii mian nomon sur la SOMERE-retpaĝoj.

Mi antaŭpagos 50 eŭrojn por ĉiu aliĝinto.

Dato Subskribo

(sendu al: EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 10551 Berlin, Telekopiilo +49-30-68 05 70 11)